

FRANCA

LA HOUSSAYE EN BRIE
77610 FONTENAY TRESIGN
FRANCE

C.C.P. 100.00 C.M. 1988

KATOLIKA ESPERANTISTO

★ Organo de FRANCA KATOLIKA ESPERANTO-ASOCIO, filio de I. K. U. E. ★

(Association Catholique Française pour l'Espéranto)

Prezidanto: S-ro R. Cl. COLAS	6, rue de Mézières	75006 PARIS
Sekr: F-ino G. PREUX	55/3 Rés. Terrasse Rue du 11 nov.	59290 WASQUEHAL
Kasistino: S-ino J. VINCENT	L' Oazo B. P. 54	49150 BAUGE
Religia konsilanto: P- ro L. BOURDON	7, av. Salomon	59000 LILLE
Peranto I.K.U.E: P-ro R. DEGRELLE	B. P. 23	54510 TOMBLAINE

C.C.P. Association Catholique pour l' Esperanto 2324 93 N ROUEN

==== la n^o: 6 F. Abono: 23 F (TTC). Kotizo: 7 F. Sume: 30 F. ====

.....

N.B. La materialon por la bulteno oni sendu al S-ino Vincent nepre antaŭ la 5-a de februaro, majo, aŭgusto kaj novembro.

.....

==== N^o 157 ==== BULLETIN TRIMESTRIEL ==== TRIMONATA BULTENO ====

*** Sankta PIO X-a, preĝu por ni. ***

==== JUNIO 1988 ====

.....

BILETO DE LA PREZIDANTO

Notre précédent bulletin rappelait à nos amis les rencontres espérantistes du passé sous le regard de Marie, dans son sanctuaire privilégié de Lourdes, où Emile Peltier est venu offrir son oeuvre et sa vie à la protectrice des chrétiens.

A ceux qui ont répondu à cette invitation, nous disons ici notre joie de cette rencontre fraternelle, de cette commune prière en union avec toute l' Eglise en cette année mariale, de ces échanges amicaux sur les thèmes proposés par notre conseiller religieux, le Père Bourdon, dont l' âge n' a pas éteint le dynamisme ni l' enthousiasme.

Nous avons cependant regretté que le petit nombre des participants à de tels entretiens ne permette pas à un plus grand nombre de nos amis d' en bénéficier.

Ce pèlerinage s' inscrit dans nos plus chères traditions et il appartient à nos adhérents de décider son renouvellement dans cinq ans, comme notre comité le propose; mais aussi de décider d' en faire un pèlerinage international comme ceux qui ont eu lieu en 1932 et 1953.

Espérons aussi que cette période sera celle de l' avenir et que nous compterons parmi nous davantage d' adhérents venus jeunes se joindre à nous, acquis à l' universalité de la foi commune, les frontières du langage abolies.

Toutes les préoccupations du monde politique sont tournées vers l' échéance inéluctable de 1992, vers la naissance de cette Europe sans frontières où les divers peuples formeront une communauté unie par les intérêts surtout matériels; il ne faut pas manquer cette occasion de donner aux hommes cet instrument de rapprochement spirituel et culturel, une langue commune éprouvée par un siècle de pratique à l' échelle mondiale.

En France le meilleur agent de diffusion de la langue est l' U.F.E., et chaque année le bilan d' activité de cet organisme témoigne de son efficacité;

..//...

Si, subvoĉe,
 Flustras konsilon:
 Se vi intencas aŭdi
 La koran voĉon,
 Vi ne devas
 Eviti la homojn,
 Provoki la dolorojn,
 Juĝipêr haŭt-koloroj.

Ho nigra Madoneto
 Ekserĉas ĉiel helpi
 La multajn korojn
 Por ĉiam esprimi
 La tutmondan amikecon,
 Kiel homa pac',
 Kiun ĉiu de vi petas,
 Kiun ĉiu al vi alvokas.

+++++

AGADRAPORTO POR LA JARO 1987

Antaŭ ol raporti pri la vivo de la asocio, mi volas saluti kaj gratuli nian karan fraton Roger Despiney, unu el la plej energiaj kaj sindonaj respondeculoj en la landa movado, kiu ĉijare festis sian 80-jaran naskiĝtagon. Li vivu 100 jarojn!

En 1987, ni kongresis en Bagnoux, kie ni plezure ekkonis nekutimajn kongresanojn. En la agrabla etoso de la domo "Les Marronniers" kaj de ties parko, ni meditis pri la Sankta Spirito sub la gvidado de P. Bourdon.

La bulteno regule aperis, dank' al la laboro de S-ino Vincent kaj F-to Marmou. Koran dankon al ĉiuj, kiuj laboras al ĝia preparado kaj realigo. En ĉiu numero, vi povas legi la protokolon de la komitatkunveno. Bonvenaj estas aŭskultantoj. Dankon al U.F.E., kiu gastigas nin en sia oficejo.

La financa stato, ne tre riĉa, estas firme prizorgata de S-ino Vincent.

Niaj rilatoj kun I.K.U.E. restas tute teoriaj: nek proponoj, nek decidoj, sur la ĝenerala nivelo, trafas nian nacian komitaton, tra niaj oficialaj perantoj, P. Degrelle kaj Bourdon, resp. Estrarano kaj plenum-komitato. En la 42-a kongreso, tri el niaj anoj partoprenis en Ĉenstovo (Pollando).

Dum la U.F.E.-kongreso en La Gaillarde (Var), P. Bourdon diservis.

Nia agema religia konsilanto kondukis esperantlingvajn preĝojn dum internacia pilgrimo al Banneux (Belgujo). Li ekinstruis Esperanton al junaj "kunuloj de S-ta Francisko" dum migrado tra Alpoj, kaj li laboras en diversaj bibliaj rondoj en la norda regiono.

S-ro B. Léger, delegito al la propagando de U.F.E., elsendis pri Esperanto ĉe la katolika radio-stacio "Notre-Dame". Li afable invitis S-ron Colas prezenti per kelkaj vortoj la katolikan Esperanto-movadon.

Tri el niaj anoj vizitis la 1-an "Kristanan semajnon" en La Chaux-de-Fonds (Svislando) en kiu partoprenis kristanoj el diversaj konfesioj.

Nia amikino F-ino Vanneau proponis, por nia kongreso 1989, la ĉarman urbon Nevers.

Nia afero ne progresos per la konvertiĝo de la Papo aŭ de la episkopoj. Ĝis nun ili aprobis kaj benis la celojn de nia movado, ĉar ĝi koncernas la homan progreson kaj la kristanan humanismon en la lumo de l' Evangelio. Sed la progreso naskiĝos de la disvolviĝo, unue de la Espo-movado, due de la spaco okupita de Eo, ĉu en la rilatoj inter la nacioj kaj la popoloj, ĉu en la specialaj rilatoj inter kristanoj de la tuta mondo. Se ni ne laboros por la kreskado de la movado, nenio efikos. Necesas konkeri ĉiuaĝajn homojn, ĉefe junajn, al nia ideo kaj al la praktikado. Se ni tion volas, ni ne restos kluboj, de maljunaj adeptoj, certe fidelaj, sed kontentiĝantaj per la nuna senmova stato. Demandu vin, kion vi povas fari por trafi la celon?

Ni laboru, ni agu, kaj Dio benos niajn klopodojn.

R. C. C.

+++++

DISTINGO

La 10-an de januaro 1988, la urbestro de Le Perreux-sur-Marne donacis al S-ro Roger DESPINEY la ARGENTAN MEDALON de la urbo, honore al liaj laboroj favore al Esperanto, ne nur en Le Perreux, sed ankaŭ je la nacia nivelo, en la sidejo de Unuiĝo Franca por Esperanto.

N.D.L.R. Supozeble, mi ne perfidos la sentojn de la legantoj, se mi plej varme gratulos nian karan fraton pro tiu plene meritita distingo.

Ankaŭ la urbestro de Le Perreux rajtas ricevi specialan dankon kaj gratulon.

KOLOMBO, SIMBOLO DE PACO

Kial do vin, karaj kolomboj, la homaro nomas simboloj de paco? Eble pro tio, ke sur la tero vere regus paco se ĉiuj homoj vivus imitante vin...

Okazis ĉi printempe, ke mi ekhavis eblecon spekti la vivon de kolomboj tute el proksimo. Geedza paro flugilhava luprenis anguleton en nia balkono. Jam fine de aprilo ili, ofte flugadis ĉirkaŭ nia loĝejo kaj ion priserĉis. Mi, stultulino, ne povis diveni iliajn pensojn. Staris en la balkono ligna ujo longforma, em kiu pasintjare kreskis floroj. Tie estis iom da tero, kaj mi intencis planti floretojn ankaŭ ĉijare. Kaj tamen iu forto mistera igis min tiun ĉi ujon malpleniĝi. Mi tiam faris kaj forveturis por la semajnfino en la vilaĝon kum mia edzo. Nia ĉambro ĉe la balkono restis malplena, kaj tiam la gekolomboj ion inventis. Iama ujo por floroj subite iĝis lulilo por la estontaj gekolombidoj. La 9-an de majo en ĝi jam estis preta nesteto, du ovoĵ kaj super ĉio, sinjorino kolombino. Num mi jam komprenis. Jen pri kio ili interparolis dum tuta aprilo! La paro flugilhava baldaŭ havos idojn-ĝemelojn. Matene mi metis apud la estonta patrino iom da tritikpaneroj, alian similan ujeton kun akvo. La kolombino, ŝajne, ektimis kaj forflugis. Tamen, kiam mi malaperis, ŝi tuj revenis kaj ekmatenmanĝis ĝojplene. Bekmanĝis ŝi rapide kaj ree eksidis sur la paron da ovoĵ.

(daŭrigota)

+++++

ENHAVO

- | | |
|---|------------------------------------|
| 1.2. Bileto de la prezidanto | La aperoj en Banneux |
| 2. Dio estas proksima | 5. Matenruĝa rideto de la rivereto |
| 2.3.5-a premio de la movado por la vivo | Utilaj informoj |
| 3. Agadraporto por 1987 | Membraro FKEA, IKUE |
| Distingo | 6. Kolombo, simbolo de paco |
| 4. Protokolo de la ĝenerala kunveno | Kotiztabelo |

+++++

KOTIZTABELO 1988

IKUE kum "Espero Katolika"	100 F
Peranto: P. Degrelle c.c.p. NANCY 2 555 38 L.	

ACFE kun "Franca Katolika Esperantisto"-unuopulo	30 F
Geedza paro	40 F
Infano ĝis 16-jara, pastro, religiul(in)o	15 F
Bonfaranto	150 F
Dumviva membro	600 F

UFE kun "Revue Française" kaj "E ^o Actualités"	205 F
UEA kun "Esperanto" kaj Jarlibro	200 F

Association Française pour l' Esperanto c.c.p. ROUEN 2 324 93 N.

+++++

Dépôt légal: 2ème trimestre 1988	!! Polycopié par l' A. C. F. E.
C.P.P.A.P. n° 62 532.	!! Prieuré St-Martin
Directeur: René-Claude Colas	!! La Houssaye-en-Brie
Directeur-délégué:	!! 77610 FONTENAY TRESIGNY
René-Jean Marmou	!! FRANCE

+++++